

Sir Harold Boulton,
La Skaja boatkanto

tradukita de Agnes B. Deans

Iru, boat', kiel bird' en flugad'
El nia sabla kaj',
Portu la princon mem en irad'
Sur la ondar' al Skaj.

Bruas tondrad', blovas venteg',
Saltas la ondegar',
Haltas sen tim' pro la muĝeg'
Nia malamikar'.

Ĉe la boat' muĝas la mar',
Ocean' estas reĝa lit'.
Lia lulil' estos l' ondar'
Kaj Florin' gardos lin.⁴

Granda homar, plena de fort'
En la batalmaten',
Antaŭ maten', jam en la mort'
Kuŝis sur Kuloden'.⁵

Ne staras plu nia hejmar'
Kaj dispeliĝis ĝi.
Tamen al ni, sia anar',
Karlo revenos li.⁶

*Traduko de la Angla poemo "The Skye Boat Song" de SIR HAROLD BOULTON (*1859 – †1935-06-01) en Esperanton de Agnes B. Deans.*

Arg-1027-2083 (2014-05-28 12:09:05)

Tiu ĉi kanto-traduko troveblas en http://eo.wikisource.org/wiki/La_Skaja_Boatkanto. Pri la origina kanto-versio vidu la retejon <http://www.educationscotland.gov.uk/scotlandssongs>.

⁴Florin' = Flora,
la heroino Flora MacDonald.

⁵= Culloden, la loko, kie la Jakobanoj estis venkitaj en 1745.

⁶Karlo = Princo Charles Edward Stuart